




Filatelistoj havus volonte tiun poŝtmarkon




Tiu ŝipo portas nomon de Karamzin



Lian nomon portis malsanulejo por psikaj malsanuloj. Ĝia ĉefkuracisto V.Koposov estis fondinto de Simbirskia Esperantista Societo.



Historio de Rusia Ŝtato



Liaj verkoj estas zorge gardataj en muzeo „Publika Karamzin-biblioteko“. La unua Simbirskia publika biblioteko estas inaŭgurita la 18-an de aprilo 1848 kiel memorejo al la unua rusa historiisto.

Aŭtoroj: Margarita Karceva, Olga Gaŝneva



Nikolaj Miĥajloviĉ
Karamzin

Urba
Esperanto-klubo
100 jaroj





Nikolaj Mihajlovič Karamzin (1766-1826)

Li estis grandega historiisto, verkisto, kritikisto. Li iĝis la plej fama simbirskano dum lastaj jaroj. N.M.Karamzin naskiĝis en Simbirsk en familio de ekskapitano. Jam en infaneco lia hobio estis studado de fremdaj lingvoj. En patra bieno, kiu situas **(lokiĝis)** tre pitoreske, kie li aŭskultis multajn legendojn, formiĝis lia karaktero. N.M. Karamzin multe kontribuis al kreado de rusa literatura lingvo. Krome, li aldonis al la rusa alfabeto literon «ë», al kiu apud Palaco de Libroj estas starigita monumento. Ĉirkaŭ 40 jarojn okupiĝis li pri literaturo. Liaj verkoj „Malriĉa Liza“, „Natalja, bojara filino“ estas ĉiam legataj kun granda intereso. La verkisto kreis ĝenron de streĉita(**intensa**) psikologia novelo. Dum 9 jaroj (1790-1799) estis verkataj „Leteroj de rusa vojaĝanto“. Li vizitis Prusion, Saksonion, Svislandon, Francion kaj Anglion. Liaj „Leteroj“ iĝis rapide konataj (**famaj**), ili aperis komence de la XIX-a jarcento dufoje germanlingve, poste angle, pole, france.

La unua li plene priskribis historion de rusia ŝtato. Interesaj estas eldiroj de A.S.Puŝkin pri N.M.Karamzin kaj lia verkaĵo. La poeto nomas „Historion“ heroaĵo de honesta homo. Krome, li skribis, ke Karamzin trovis Rusion kiel Kolumbo Amerikon. Li finis sian verkadon en 1815. Oktobre 1817 estis publikigitaj jam 8 volumoj. Fine de januaro 1818 Karamzin prezentis unu ekzempleron al caro. Februare oni komencis vendi la librojn. Bedaŭrinde lia morto rompis lian laboron. La 12-an volumon la verkisto ne finis.



Monumento al N.M.Karamzin (skulptisto S.I.Galberg)

Tiu monumento aperis en la jaro 1845 laŭ iniciato de simbirskana nobelaro per popolaj mondonacoj. Ĉi tie estis planita skvaro. Tiu skvaro, fondita en la jaro 1865, estas unu el la plej belaj kaj la plej pitoreskaj en nia urbo. Printempe ĉi tie floras belaj siringaj arbustoj. Tio estas la plej ŝatata loko

por geamantoj. La monumento estas ofte pentrita kaj fotita. Ĝiaj skulptistoj estis akademianoj S.Galberg kaj P.Klodt. P.Klodt skulptis fajnan kaj gracian muzon de historio Kliona. En maldekstra mano ŝi tenas trumpeton, la simbolon de historio. Per dekstra mano ŝi metas la tabulon de historio de rusa ŝtato sur altaron de historio.



Fragmento de la monumento

Antaŭe (en niĉo) estas busto de Karamzin. Maldekstre kaj dekstre estas kupraj bareliefoj pri la vivo de la historiisto.

Dekstre li legas al Aleksandr la Unua sian verkon.

Maldekstre li ricevas informon, ke caro Nikolaj la Unua donas al li 50 000 rublojn por lia kuracvojaĝo al Italio. Sed estis malfrue. Li estis tre malsana.

